

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 2-a parto
Claude Gacond, 266-a radioprelego, 1968.11.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi aŭtunon malfermiĝis la jubileo Mahatma Gandhi. Kiel ni jam anoncis, la svisaj esperantistoj festos tiun jubileon en La Chaux-de-Fonds la 23-an kaj 24-an de novembro. Ni certe havos la okazon aŭdigi la voĉojn de la prelegistoj, kiuj parolos en tiu manifestacio.

A.- La pasintan semajnon ni tradukis al vi kelkajn paĝojn el la tagĵurnalo de Romain Rolland. Ili rakontis pri la restado de Gandhi en Svislando. Estis en decembro 1931. La Mahatma revenis el la Konferenco de la Ronda Tablo okazinta en Londono. Post tranoktado en Parizo li alvenis en Territet por viziti sian amikon Romain Rolland. Gesinjoroj Edmond kaj Yvonne Privat lin akompanis kaj la svisa popolo lin festis. Dank'al Romain Rolland ni kvazaŭ ĉeestis la vesperan preĝadon. Estas la 6-a de decembro je la momento de la vespermanĝo. Ni troviĝas en la vilao de Madeleine Rolland, la fratino de la verkisto. Ni daŭrigas la tradukadon de tiu interesa tagĵurnalo de Romain Rolland.

Cl.- *« Ni lasu Gandhi vespermanĝi : kvardeko da daktiloj, krudaj legomoj, kaprina lakto. Ni decidus rendevuon por la morgaŭa mateno. Gandhi insistas, por ke ĝi okazu ĉe mi, en la vilao Olga, tio por eviti al mi la transiron de la ĝardeno. »*

A.- Romain Rolland malbone fartas. Li loĝas en vilao najbara al tiu de Madeleine Rolland, kie loĝas Gandhi. Ni daŭrigas la tradukon de la tagĵurnalo :

Cl.- *« Mira kaj la hindoj venas vespermanĝi kun ni. Ankaŭ ili estas vegetaranoj, sed malpli striktaj ol Gandhi. Nek ovoj, nek fromaĝo, sed legomoj kuiritaj kaj pastaĵoj al ili konvenas.*

A.- *Depost la alveno de Gandhi ĝis lia forveturo nia telefono ne ĉesos sonori, kaj Marie havos multe da laboro. »*

Cl.- Klarigo : Mira estas filino de angla admiralo, ŝi estas la helpantino de Gandhi. Marie estas la sekretariino de Romain Rolland. Ŝi poste fariĝos lia edzino.

A.- *« La morgaŭo, lundo, estas la « tago de la silento » por Gandhi. Li ne parolas, sed li aŭskultas ; kaj li diras ridante : tiu tago estas por la ceteruloj la plej taŭga momento por trudi al li ĉion, kion oni deziras al li aŭdigi. Li sin devigas ĉion elteni sen repliki. Tamen li kelkfoje esprimas sian opinion, ĉar li ne defendas al si fari kelkajn skribajn resumajn respondojn.*

Cl.- *Ekzakte je la deka matene Gandhi estas ĉe mi. Li dormis ĝis la oka, kio ne estas kutimo. Dum la noktoj en Londono li konsentis por si kaj por la siaj nur tri aŭ kvar dormhorojn. Ili rehejmiĝis je la unua matene kaj vekigis je la tria por la preĝado. Pro tio, li malplej multe, ili estas videble lacegaj.*

A.- *En la londonaj nebuloj de novembro Gandhi plie kaptis fortan malvarmumon ; sed lia fortika konstitucio tre rapide venkos ĝin sen ia ajn ŝanĝo en liaj iradoj kaj mitingoj.*

Cl.- *Li do alsupras mian ŝtuparon. Lin anoncas lia intermita spasma rideto. Mi lin sidigas en la grandan faldfotelon apud mia tablo, sur kiu mi alkubutiĝas, min klinante al li en la turnseĝo de mia skribejo.*

A.- *Tuj li eligas siajn nudajn piedojn el la sandaloj kaj faldas la kruojn sub sin, sin volvante en sia burnuso. Li portas larĝajn okulvitrojn, kies vitroj permesas vidi proksime kaj fore dank'al du juntitaj duonaj arklensoj. Lia vizaĝkoloro estas pli sunbrunigita ol malhela. La krani-profilo estas longforma, kaj tiun efekton pliiĝas la manko de la antaŭaj dentoj, kio etigas la muzelon, kiel ĉe rato. La suba lipo sufiĉe dika antaŭenas, kaj la superan kovras griza maldensa liphararo. Rektas la nazo iom enprofundigita, dispremita ĉe la fino, kun larĝaj truoj. La oreloj ege elstaras. La frunto larĝas kaj estas fortike konstruita ; ĝi faltiĝas*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 2-a parto
Claude Gacond, 266-a radioprelego, 1968.11.13 & 16

profunde dum li parolas ; sed la vangoj kaj la resto de la vizaĝo, ankaŭ el fortika substanco, ne posedas la faltojn de niaj eŭropaj vizaĝoj.

Cl.- *La unua aspekto pri gracileco estas trompa : la viro estas ege fortika. Liaj manoj, grandaj kaj magraj, kiuj premas sur liaj brakoj la burnuson, estas ostozaj kaj aperigas ŝvelajn vejnojn kaj muskolojn. Ili al mi malkaŝas, pro siaj daŭraj tremadoj kaj tiuj de la piedoj, kiujn oni divenas sub la burnuso, la nervozecon de la viro tiom kvieta, sed vigla, kaj sin ĉiam reganta. Mira konfirmos al mi tiun impreson. Ŝi rakontis al mi la sentemon de tiu karno, kiun la spirito regas. Kiam ŝi masaĝas liajn gambojn, kun la delikata atento, kiu ŝin karakterizas, la plej eta grajno en la oleo, sub ŝiaj fingroj rulpremita, vekas ĉe Gandhi etan dolormovon rapide kontrolatan.*

A.- *Ĉeestas la interparoladon mia fratino, kiu tradukas liajn vortojn, ĉar Gandhi nur parolas kaj komprenas la anglan. Mira sidas sur la tapiŝo, apud niaj piedoj ambaŭ sekretarioj de Gandhi memornotas ĉion, - kaj, ekde la dua interparolo, Marie ankaŭ notos por mi ĉiujn vortojn.*

Cl.- *Tiun unuan tagon, kiel mi diris, mi sola parolas. Mi detalege klarigas al Gandhi la moralan kaj socian staton en kontinenta Eŭropo, kaj ĉefe en Francio. »*

A.- Ni devas interrompi la legadon de la tagĵurnalo de Romain Rolland, kvankam la diroj de la granda verkisto estas ege interesaj. La fluo de la jaroj permesas konstati, kiel li bone komprenis la dramon, kiu sin tiam ludis en Eŭropo. Romain Rolland sin demandas, ĉu neperforto povos ludis rolon en Eŭropo, aŭ ĉu estas jam tro malfrue ? Li antaŭvidas la alvenon de detruiga milito. Li parolas dum unu horo kaj duono. Vi do komprenas, ke en la kelkaj minutoj radioelsendaj, pri kiuj ni disponas, estas vere neeble resumi tiun longegan monologon. Por reveni al la tagĵurnalo de Romain Rolland, jen kiel la verkisto priskribas la reagojn de la silenta aŭdanto :

Cl.- *« Gandhi min aŭskultas ege atente, plej ofte sen rigardi al mi. Li estas profile turnita, pro tio mi povas sekvi ĉiujn liajn reagojn. Li rigardas prefere al mia fratino, kiu tradukas ĉiujn miajn frazojn. Sed ĉe la ĉefaj eldiroj, li turnas al mi sian inteligentan kaj koncentritan rigardon kaj pli ol unu fojon li vigle balancas la kapon por atesti sian aprobon.*

A.- *Kiam mi ĉesis paroli, Gandhi skribas sur sia notlibreto, ke li hodiaŭ meditos miajn asertojn kaj morgaŭ respondos al mi. Mi aldonas, ke mi dezirus ankaŭ paroli pri lia projekto de veturo tra Italio, kiu sekvos lian restadon en Villeneuve, sed ke tion mi faros alian tagon. Li skribas sur sia notlibreto, ke, se tio eblus, li estus preta min tuj aŭskulti. Mi faras kvinminutan paŭzon, dum kiu oni servas al Gandhi, laŭ la ĉiutaga kutimo tio okazas je la dekunua matene, unu bovlon da citronigita varma akvo ; kaj mi mem trinkas tilian infuzajon. »*

Cl.- En sia dua monologo Romain Rolland avertas Gandhi pri la hipokriteco de la faŝismaj invitoj. Gandhi aŭskultas kaj registras ; kaj la kunveno finiĝas iom post meztago kaj duona horo.

A.- Tiu interesa priskribo de la restado de Gandhi en Svislando estas traduko el la tagĵurnalo de Romain Rolland. La venontan semajnon vi aŭdos pri la subita alveno de strangulino kaj de dika brita policisto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-